James Yorkston,

# Moliino Malon'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. En bela Dublino,
Jen vivis knabino,
Enamiĝis unue en tiun ĉi mi.
Ĉareton ŝovante
Tra l' stratoj irante
Ŝi vokis : Jen konkoj, jen ostroj! Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tutfreŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi, ho!

2. Veturis ŝi tiel
Tra l' stratoj samkiel
Ĝin faris antaŭe gepatroj de ŝi.
Sian ĉaron ŝovante,
Tra l' stratoj irante
Vokante : Jen konkoj, jen ostroj! Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tutfreŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi, ho!

3. Ŝi iĝis malsana,
Sanig' estis vana,
Memoras mi ĉiam ankoraŭ pri ŝi,
Tra l' stratoj iranta,
Ĉareton ŝovanta,
Vokanta: Jen konkoj, jen ostroj! Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tutfreŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi, ho!

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2006-12-04.*

*MR-451-2 (Esperanto) / Arg-374-735 (2008-11-29 16:14:27)*

James Yorkston,

# Mol Ní Mhaoileoin

*tradukita de Seán de Fréine*

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en la Irlandan de Seán de Fréine.*

*Arg-374-817 (2007-05-16 20:17:33)*

*Laŭ la irlanda kantlibro "Sing Along Linn" la tradukinto de tiu ĉi kanto estas Seán de Fréine, 36 Nutgrove Park, Cluain Sceach, Baile Atha Cliath 14, Irlando. Tel: 00353-(0)1-2694660 e-mail: defreine@iol.ie*